

ESPERANTO

★ TRIUMFONTA ★

Nova titolo post 1 januaro 1925: „Heroldo de Esperanto“.

Aperas dufoje en la semajno (merkrede kaj sabate). — Prezo de unuopa numero 0.20 sv. fk. aŭ egalvaloro.

Protaktantoj:

D-o Leono Zamenhof, Warszawa
W.M. Page, advokato, Edinburĝo
Ernest Archdeacon, Paris
J. Gill North, komercisto,
Barcelona

H. Fischer, grandindustriisto,
București
Frans Schoofs, Antwerpen
P. v. Medem, bank-kaj fabrik-
direktoro, Kaunas

N-o 224
13. 12. 1924

Redakcio:

Cefredaktoro: Teo Jung.

Redakciaj kunlaborantoj:

H. Jung kaj M. Butin, L. K.

Administracio:

Horrem b. Kĉlin, Germanlando

Abonprezo ponumera
de duonsemajna ekspedado: egal-
valoro de 0.20 sv. fk., mendita per
loka postoficejo 0.15 sv. fk.;
de semajna ekspedado (du numeroj
kune): 0.15 sv. fk.

Anonprezo
po unucentimetra kolonero egalvaloro
de 2.— sv. fk. (antaŭpage 1.50 sv. fk.),
minimuma aleco 5 cm.

Antwerpen, Barcelona, București, Edinburĝo, Horrem, Kaunas, Paris, Warszawa

Klara Zamenhof mortis la 6 Decembro.

En tiuj ĉi tagoj la tutmonda gesamideano kutimas festi la datrevenon de la naskiĝo de nia Majstro D-o L. L. Zamenhof. Estis je la 15-a de decembro 1859, kiam la aŭtoro de Esperanto ekvidis la lumon de la mondo. Ankaŭ en tiu ĉi jaro la gesamideanoj jam ĉie preparis sin por inde aranĝi la memortagon. Nun ĝuste en la festpreparojn falis terura bato, de-
truante la ĝeneralan festoĝojon, plenigante niajn korojn per profunda funebro: la sciligo pri la morto de la Majstro-vidvino, s-ino Klara Zamenhof.

Emociite staras la esperantistaro, preskaŭ ne komprenante la akran baton de l' sorto. En Wien ni ankoraŭ vidis ŝin, tute vivan, tute afablan, tute interesitan pri ĉio, kio koncernis nian movadon, — kaj jam ŝi ne vivas. Ŝi iris renkonte al tiu, kies fidela akompanantino ŝi estis dum lia vivotempo.

Honoron al ili ambaŭ, honoron al la nobla geedza paro, honoron al Lazaro Ludoviko kaj al Klara Zamenhof.

T. J.

La Patrino de Esperanto.

Ŝi foriris el tiu ĉi mondo kviete, senbrue. Foriris tiu, kiu estis vera kolono subtenanta la malfortikan konstruaĵon de Esperanto en ĝiaj unuaj neceraj jaroj. Foriris tiu, kiu adorante en sia koro la grandan idealon de sia edzo sciis oferi por ĝi ĉion, kio estis por ŝi plej kara. Sen ŝia apogo morala kaj sinifero D-o Ludoviko Zamenhof eble ne estus elteninta la batalojn de la sorto, kiu dum la tuta vivo kruela lin atingadis. La rolo, kiun ludis Klara Zamenhof en la Esperanto-movado, estas al ĉiu bone konata kaj ne nur unu fojon en la historio de Esperanto evidentiĝita. Esperanto estis por ŝi plej kara infano, por kiu mankis al ŝi nek amo nek sinifero.

Kaj post la morto de ŝia edzo la penso pri Esperanto plenigis ŝian tutan estajon. La esperantistaro bone scias ŝian akuratecon en plenumado de ĉio, kio rilatis ne nur Esperanton, sed ankaŭ esperantistojn. Laŭforte ŝi penis subteni la esperantan movadon; ŝi neniam forlasis esperantajn konsidojn en sia urbo kaj malgraŭ malfavoraj kondiĉoj ne preterlasis eĉ unu postmilitan universalan kongreson. En tiu ĉi rilato ŝi ne nur plenumis la moralan testamenton de ŝia edzo, — ŝi plenumis tion, kion ordonis al ŝi ŝia sentema animo kaj la adoro por la ideo.

Se D-o Ludoviko Zamenhof estis por Esperanto patro, Klara Zamenhof meritis la nomon de ĝia patrino.

La sorto por ambaŭ ne estis favora. D-o Ludoviko Zamenhof, kiel ni scias, siajn du lastajn jarojn pasigis en kruelaj moralaj kaj fizikaj suferoj. La milito, kiu ŝajnis pereigi ĉion, frakasis en liaj okuloj



S-ino Klara Zamenhof.

(Unu el la plej lastaj fotografadoj de la majstro-vidvino, farita dum la Kongreso de Wien.)

Intencis festi ni, sed — devas plendi.
Ĉiel nigriĝis. Nokto kovris vojon.
Ekfalas fulmo en la festoĝojon
Por funebrege niajn korojn fendi.

Anstataŭ ĝojo — regas nur doloro.
Terura bat' de senkompata sorto!
Plej noblajn korojn avidema Morto
Forrabas ĉiam en tro frua horo.

Jam staras Esperanto orfigite:
Post sia Patro perdis ĝi Patrino.
Animo ŝia flugis en senfinon
Renkonte al la Majstro altspirite.

Sed ni, ĉe ŝia tombo arigante,
Promesu, ke per-age kaj -parole
Ni por la orfo penos plejbonvole,
Al venko kaj triumf' ĝin kondukante.

T. J.

ankaŭ la penege konstruita de li idealo de intergenta frateco, la grava kormalsano kondamnita lin al seninterrompaj korpaj suferoj, ne donite al li en la lastaj monatoj eĉ unu momenton da ripozo. Inter la terura bruo de milito tiu ĉi doloriga momento en la vivo de D-o Ludoviko Zamenhof trapasis kvazaŭ nerimarkite de la esperantistaro.

La lastaj monatoj de Klara Zamenhof estis ankaŭ, bedaŭrinde, seninterrompa vico de suferoj. De la lasta kongreso en Vieno, kie ŝi estis jam malsana, reveninte hejmen, ŝi plu ne forlasis la liton, kondamnita pro sia malsano al kruela simalsatigado kaj konstantaj fizikaj doloroj. Ŝi antaŭsentis la proksimiĝon de la morto, kio ankoraŭ pli akriĝis ŝian suferadon. Dum sia longa malsano ŝi neniam forgesis pri Esperanto kaj aŭ mem aŭ pere konatiĝis kun ĝia movado. Ŝi volis iri al renkonto kun sia edzo kun plena konvinko, ke ŝi tute plenumis lasitan al ŝi de li testamenton.

Hodiaŭ plu ne vivas la ambaŭ gepatroj de Esperanto! La orfiginta infano iros en la mondon jam sen ilia apogo! Ĉu ĝi ne bezonas plu la zorgojn patrinajn? Ĉu fariginte matura ĝi memoros pri idealoj de siaj gepatroj, kiuj laboris sinifere ne nur por ĝia korpo, sed ankaŭ por ĝia animo?

Estus tre bedaŭrinde, se la bela ideo inspirita en Esperanton mortus kune kun ĝia kreinto!

D-o Leono Zamenhof.

* * *

Sur la tombo de s-ino Zamenhof.

Kiom da fojoj mi priskribadis, kio okazis sur la tombo de Majstro.

Nun — jam, sur la tombo de s-ino Zamenhof.

La morto, tiu kruela kaj senkompata rabulo — forkaptis de ni nian patrinon. La patrinon de Esperanto.

Ŝi iris tien, el kie oni ne revenas plu... Griza, peza la tago. Nuba, humida — kaj de tempo al tempo neĝero. La tuta naturo ŝajnas priplori la orfigon de Esperanto.

Malvarme kaj kviete staras la anguldomo Królewska 41. Tra ĝiaj okul-fenestroj nenio evidentiĝas, kio okazas supre, sur la tria etaĝo. Kaj la vivo iras siavoje. La veturiloj rapidas. La homoj kuras. La fiakroj bruas. La aŭtomobiloj trumpas. Ĉio estas plene absorbita per siaj ĉiutagaĵoj.

Nur ni, nemultnombraj esperantistoj varsoviaj, kun premo ĉe l' koro kaj okuloj ŝenesprimaj, aŭtomate lasas nin treni de niaj piedoj supren. Sur la trian etaĝon. La lastan fojon!!

Nigra la ĉambro, nigra la ĉerko, nigraj la funebraĵoj, nigra la atmosfero, nigraj la homoj, eĉ la kandeloj ŝajnas bruli nigre. Malvarma morto ŝvebas en la aero. Penetrante kaj tremigante.

Sed ne tempo estas por trondsoni sin al tiu kruela ĝuo de ĉagrenado, ne temp' — por meditati. La „karavano“¹⁾ venis.

Ok plej fervoraj esperantistoj perfortis sian animstatojn kaj metis siajn ŝultrojn por elporti la ĉerkon, por fari la lastan servon, por plenumi la lastan devon, kiun ni ŝuldas al nia patrino.

Ho, jes, nia patrino ŝi estis. Ŝi ne estis nur simple edzino de nia majstro. Prenante ĝis la lasta vivospiro plej aktivan parton en la esperantista movado, ŝi krom tio arigadis ĉirkaŭ si la tutan esperantistaron.

Kiu ne memoras ŝin dum la kongresoj? La kulminacian punkton ŝi prezentis. La tuta esperantistaro sentis sin feliĉa vidante, jes, nur vidante ŝin. Kaj se iu havis ankoraŭ la okazon, havi ŝian subskribon aŭ fotografadon — tiu sentis sin jam elektito de l' sorto.

Ne senkaŭze ŝin formale atakadis multmiloj da samideanoj, petante ĉu pri subskribo, ĉu pri permeso fotografi ŝin. Kaj al neniu tiu aminda, serena kaj plej modesta

¹⁾ Funebra veturilo.

(Fino de artikolo de sur paĝo 1.)

animo rifuzis. Mi memoras en Vieno — la lasta kongreso, kiun ŝi ĉeestis —, kiel ŝi, estante jam tre malsana, kuradis tamen de unu kunveno al alia kaj kun energio de dudekjaria fraŭlino partoprenis ĉiujn ceremoniojn de la kongreso, kaj krom tio ankoraŭ — multegajn nekalkuleblajn aŭdienciojn.

La plej granda el ĉiuj sentoj, kiujn oni por ŝi flegis, estis: a. m. Esis nek unu samideano koninta ŝin, kiu ĉe aŭdo de ŝia nomo povus deteni sin de ridero ĝojplena.

Kaj tiun karan kaj dolĉan estaĵon — kiun eble neniu en la mondo povus ofendi — la sentanta morto forrabis.

Kaj ne estas ĝi plu inter ni.

Peze sur la koro. Malvarme en la animo. Sed ni iras kaj iras. Ĉiujn stratojn trairas. Jen — Dzikla 9. La tuta funebro-marŝo haltas. Aliĝas multaj el la pasantoj. S-ino Zamenhof mortis! Ho, kiel noblekora ŝi estis! La marŝado daŭras, ni ĉiam antaŭiĝas. Jen vidigas jam la tombejo de malproksime. Malpaciencaĝas iuj. Aliaj frankviligas: por kio rapidi? Ni ja ŝin plu ne vidos.

Sur la tombejon ni venas. En plena ordo. En la antaŭo — la delegacioj kun florkronoj. La unua — belega krizantema granda florkrono portis la surskribon: Al kara s-ino Zamenhof — La esperantista Rondo Konkordo kaj Centra Komitato; dua: Al edzino de Majstro — UEA; tria: Al s-ino Zamenhof — Laboro kaj Progreso; kvara: Al Klara Zamenhof — Esperanto Triumfonta; kvina: Al s-ino Klara Zamenhof — Pola Esp. Asocio.

Nun sekvas reprezentantoj de diversaj societoj, grupoj, rondoj kaj sekcioj esperantistaj. Fine enveturas la „karavano“ sekvata de la familio (filinoj Sofio kaj Lili kaj filo Adam), parencoj, amikoj, konatoj kaj respektintoj. La tuta ceremonio konsistas el ĉirkaŭ 500 personoj.

Jen tribunon en la vestiblo. Post momento sur siaj ŝultroj ok junaj samideanoj enportas la keston (ĉerko) kuan la korpo de la kara morintino kaj metas ĝin antaŭ la tribunon.

La kantoro²⁾ plorkantas la preĝojn, kiuj traboras la korojn. Jen la predikisto oratoras. Bonega parolo. Guste la mort' de Rahelo — nia prapatrino — estas nunsemajne ĉe la hebreaj aktualaj, kaj kun ŝi belege ekkomparis profesoro Schor, la varsovia predikisto, nian Majstro-edzinon.

Per belegaj, kortuŝaj vortoj penetris niajn korojn kaj trapikis la animojn de la aŭskultantaro la orbuŝa Leo Belmont, kiu tenis nin dum pli ol duonhoron en senĉesa entuziasmo. En la nomo de la tuta esperantistaro li ŝin adiaŭis.

En la nomo de la tuta eksterlanda samideanaro adiaŭis s-ino Cense.

En la nomo de la Monumenta Komitato D-o Robin.

De la Akademia Esperantista Rondo — s-o Schumacher.

De l' I.S.A. (Internacia Studenta Asocio) — s-o Kos.

De „Laboro“ — s-o Domostawski.
De Pola Esperanto Asocio — s-o Kosteki.
De Pola Akademia Esp. Rondo — s-o Kosteki.
De Progreso — s-o Bronstein.
De UEA — s-o Ad. Oberrolman.
De „Esp. Triumfonta“ — s-o Ad. Oberrolman.

De T.E.K.A. — D-o Robin.

Fine de la plej juna kaj plej amata infano de s-ino Zamenhof adiaŭis sian patrino la Esperantista Rondo „Konkordo“ (inkluzive ĉiuj adeptoj de la Interna Ideo) pere de s-o Wiesenfeld.

Jes, tio estis ŝia plej amata, plej lasta infano. Se ne ŝi — „Konkordo“ ne vivus. Al „Konkordo“ ŝi donis la eblon vivi, kaj mem — formortis.

Dormu pace nia Patrino!
Honoro kaj Gloro al Via Memoro!

Pola Instituto de Esperanto
(Edvard Wiesenfeld, L.K.)

Varsovio, 8. 12. 1924.

²⁾ Hebra riplenumanto.

Radio.

Esperanto oficiale uzata por praktika celo.

(Parolado farita en Esperanto de s-o Direktoro Glück, dimanĉon, 7 dec., je 12 h. MET, el stacio Königswusterhausen.)

Nevidebla aŭskultantaro!

La 4-an de decembro okazis en Berlin la solena malfermo de la granda germana Radio-Ekspozicio, en la ĉeesto de la prezidanto Ebert, de la ŝtata sekretario D-o Bredow, de la ĉefurbestro D-o Boess kaj multaj reprezentantoj de la radio-industrio.

En la malferma parolo D-o Boess komunikis, ke per tiu ĉi ekspozicio la deziro estas plenumita, ke Berlin fariĝu moderna urbo por fojro, ne volante konkuri kun la ĝisnunaj fojrujoj, sed inaŭgurante speciale fakajn fojrojn. La urbo Berlin esperas, servi tiamaniere al la germanaj industrio, ekonomio kaj scienco.

Ŝtata sekretario D-o Bredow, pioniro de la radio-movado, menciis en sia parolado, ke

radio nun en Germanujo pli kaj pli disvastiĝas, tiel ke monate proksimume 80 000 familioj aliĝas al la radio-movado.

La ŝtata postministerio penadas ne nur gardi siajn rajtojn, sed ankau plenumi la devojn, por ke radio fariĝu publika posedajo por ĉiuj kaj helpu al la plialtigo de la kultura nivelo de la popolo.

Precize je la 12-a oni senfadene radie sciigis per la ĉefstacio Nauen la malfermon de la Berlina Radio-Ekspozicio, kaj per tri stacioj tiu ĉi radio-telegramo iris ĉirkaŭ la tuta mondo. La lasta stacio, Honolulu, konfirmis la akcepton per la vortoj „Honolulu, la granda germana radio-ekspozicio malfermita“ Por tiu ĉi sciigo ĉirkaŭ la tuta terglobo oni bezonis nur 6 sekundojn. Post kelkaj minutoj jam alvenis gratuloj el Nordkaj Sud-Eŭropo kaj New-York.

La ekspozicio mem estas la ĝis nun plej granda radio-ekspozicio, laŭ nombro de la partoprenantoj superas eĉ tiun, kiu okazis antaŭ kelkaj semajnoj en Ameriko.

Oni tie ĉi vidas la plej simplajn, plej malmultekostajn aparatojn apud la plej perfektajn, plej multekostajn tipojn. Speciala aranĝo ebligas ke la aŭskultanto povas aŭskulti en 70 ĉirkaŭitaj ĉambretoj la disaŭdiigojn de la diversaj stacioj, absolute neĝenata per la bruo de la ekspozicio.

Grandiozan impreson faras la novaj grandegaj funel-riceviloj en la halo, ankau ekstere troviĝas funelejo de kelkaj metroj da longeco kun maŝina ekmojo, kiu samtempe donas sciigojn al centmiloj da homoj.

Mi hieraŭ vespere aŭdis koncerton, disaŭdiigitan per tiuj ĉi funelejoj en tia belsoneco ke oni povis aŭdi absolute klare eĉ la ordinare nur tre malfacile aŭdeblajn sonojn de la violono.

Krom tio, la ekspozicio enhavas unuarangan vidindaĵon: la historian radio-ekspozicion, kiu montras la unuajn provojn de Herz ĝis la plej modernaj sukcesoj de la radio-tekniko, ekz. la radio-aparatojn de la Zeppelin-aerŝipo Z. R. 3., de la grandaj vaporŝipoj, de veturantaj trejnoj ktp.

Ĉiu vizitinto, veninte Berlinon, eĉ el la plej malproksimaj landoj, ricevos tiom da novaj impresoj rilate al la radio-tekniko, vidos tiom da interesaĵoj, ke li certe estos dankema al tiu, kiu instigis lin al tiu ĉi vizito.

Tial mi denove vokas al vi: Vizitu nian grandan Radio-Ekspozicion, por ke vi ricevu kompletan percepton, kiamaniere tiu mirakla mondo, tiu sorca lando de la nevideblaj eterondoj montras al la nuna homaro novajn vojojn, kaj donas neatenditajn ŝancojn por kulturo.

Tre estimata aŭskultantaro!

Mi petas vin, transdoni la al vi nun faritajn sciigojn al la gazetoj de via lando, dirante, ke vi ricevis ilin per Esperanto kaj sendu al mi, direktoro Glück, Berlin W. 35, Potsdamerstrasse 115, mallongan sciigon, por ke ni esperantistoj liveru la pruvon, kian grandan servon Esperanto donas al la moderna kultura mondo.

Radio kaj Esperanto, fratoj de nova montriĝanta tempo gvidos kaj devas gvidi la homaron sur pli altan kulturnivelon!

Estimata aŭskultantaro!

Mi atentigas vin, ke post ok tagoj, dimanĉe je la sama horo sur ondo 2800 la stacio Königswusterhausen disaŭdigos memorigan parolon kaj kantojn rilate al la datreveno de naskiĝtago de Zamenhof.

Samtempe mi sciigas vin ke hieraŭ en Berliner Börsen-Courier, la granda financa taggazeto, mi aperigis 4 paĝan ilustritan aldonon pri Esperanto. Tio estas por ni eble unu el la plej grandaj sukcesoj. Ĉiusemajne aperos artikoloj en tiu ĉi gazeto.

Vivu Esperanto!
Ĝis reaŭdo!

Esp. saluto el Lyngby-stacio.

La 3. 12. s-o Paul Lendorff salutis el stacio Lyngby-Radio (Danujo) la germanajn radio-amatorojn, kiuj uzas Esperanton.

Disaŭdigo el Königswusterhausen.

Dimanĉon, la 14. 12., tagmeze je la 12-a sur ondo 2800 la ĉefstacio Königswusterhausen (Germanujo) dissendos memorigan parolon kaj kanton en Esperanto okaze de la datreveno de l' naskiĝtago de D-o Zamenhof. Parolos s-o Ellersiek kaj kanton lernantinoj el la esp. lernejo de Flatau (lernejo de Esp.-Gruparo Berlin).

Cetere la ĉefstacio Königswusterhausen de nun ĉiudimanĉe je la sama horo kaj sur la sama ondo disaŭdigos esp. programon de 10 minutoj. Oni gratulu pro tio al la plej granda ŝtata radio-stacio en Germanujo! (Hauptfunkstelle Königswusterhausen).

XI-aj Internaciaj Floraj Ludoj.

La Komitato de la Internaciaj Floraj Ludoj invitas partopreni la jenajn konkursojn.

Ordinaraj temoj.

Originalaj tekstoj.

1. Originala versaĵo kantanta Amon.
2. Originala ama verko en prozo.

Tradukitaj tekstoj.

1. Traduko de versaĵo. „La Pastoreta“ de M. Costa i. Llobera.
2. Traduko de prozaĵo „Via Blanquerna“ de L. Ribera.

Eksterordinaraj temoj.

(Se ne speciale indikita, la temo estas laŭvola.)

Propozis premiojn:

1. S-o Narciso Bofill, inĝeniero, Palma; 100 pes.
2. S-ino Maria Tornaris de Bofill, Palma; 50 pes.
3. F-ino Amalia Bofill Fornaris, Palma; 50 pes.
4. S-o Antonio Rosselló, Direktoro de Compañía Mel-lorquina de Electricidad, Palma; 100 pes.
5. José Salom, masonisto, Palma; 50 pes.
6. S-o Petro J. Tous, Fabriko de maŝinoj, Palma; 100 pes.
7. S-o Miguel C. Oliver, juĝisto, Palma; 50 pes. Temo: Altaj konsideroj de ordo morala, religia, pedagogia, ekonomia kaj regiona kiuj konsilas la restarigon de la „Normal de Maestras“ sub la gvido de la „Religiosas del Real Colegio de la Pura“ de Palma
8. S-o Mariano Japutooti, materialoj por konstruaĵoj, Palma; 50 pes.
9. S-o Jaime M. Granada, Palma; 50 pes.
10. Banko „Fomento Agrícola de Mallorca“, Palma; 100 pes.
11. Banko „Crédito Balear“, Palma; 100 pes.
12. „Fomento del Cívismo“, Palma; 50 pes.
13. „Caixa de Ahorros y Monte de Piedad de las Baleares“, Palma; 100 pes.
14. „Asociación per la Cultura de Mallorca“, Palma; 50 pes.
15. „Banco Vitalicio de España“, Palma; 50 pes.
16. „Ferrocarril de Sóller“, Palma; 50 pes.
17. Ruĝa Kruco (Santa Catalina), Palma; 50 pes.
18. Prezidanto de K.E.F.: 100 pes. Temo: Plej bona elekto kaj traduko de katalunlingvaj verkaĵoj de valenciaj aŭtoroj.
19. Sekretario de K.E.F.: 100 pes. Temo: Plej bona elekto kaj traduko de katalunlingvaj verkaĵoj de rusilonaĵaj aŭtoroj.
20. Episkopo Moŝto de Mallorca; 100 pes.
21. Cámara Oficial de la Propiedad Urbana; 100 pes.
22. Sociedad General de Tranvías Eléctricos, Palma; 50 pes.
23. Esp. Klubo Palma; 100 pes.
24. Oficiala Cambio de Comercio, Industrio kaj Navigado de Palma; 100 pes.
25. Fomento de Turismo de Palma; artobjekto pri Palma.
26. Asociación de la Prensa de Baleares; 50 pes.
27. S-o Fernando Ramirez, sekretario de Delegación de Hacienda de Palma; 50 pes.
28. S-o Miguel Guasch, ministro, de Palma; 50 pes.
29. S-o Antoni Coll, agrikulturisto, de Palma; 50 pes.

La Komitato:

Kolomano de Kalocsay, prezidanto. — Jakob Schmid. — Eusebio Arigas. — Narcia Bofill. — Fred. Pujulà i Valls. — S. Alberich Jofre, sekretario.

Notoj.

1. La aŭtoroj de la kvar premiataj Ordinaraj Temoj (Originalaj Tekstoj I, II; Tradukitaj Tekstoj I, II) ricevos laŭorde bele binditan ekzemplaron de la verkoj: Pro Istar, Kataluna Antologio, La Tragedio de l' Homo, Fabiola. Se la merito de la premiataj aŭtoroj de la Tradukitaj Tekstoj I, II, tion konsilas, oni premios ĝin per unu el la premioj por temo laŭvola.
2. Al la aŭtoro de la plej bona teksto (versaĵo aŭ prozaĵo) el la kvar ordinaraj premiataj verkoj, la Komitato aljuĝos la *Naturan Floron* kaj la rajton elektii Reĝinon de la Festo.
3. La verkoj prezentotaj devas esti verkigitaj en plene Fundamenta Esperanto kaj ne ankoraŭ eldonitaj nek anonciataj.
4. La Festo de la XI-aj Internaciaj Floraj Ludoj okazos en Palma de Mallorca dum la XII-a Kongreso de Kataluna Esperantista Federacio, majoj 1925.
5. Sur la manuskripto, kiu devas esti ricevitaj antaŭ la 15 marto 1925 de la Sekretario de la Floraj Ludoj (s-o S. Alberich Jofre, str. Breŝon de los Herreros, 18, 1-er, 1-a, Barcelona), oni devas skribi devizon, kaj sendi en koverto fermita, kiu portos la saman devizon, la nomon kaj adreson de la verkinto.
6. Manuskriptoj ne estas resendataj, eĉ se ili alvenis post la datolimo por la akcepto de verkoj. Oni konservu kopion de la manuskriptoj.
7. La membroj de la juĝontaro partoprenos en neniu el la konkursoj.
8. La komitato publikigos la verdikton per „Kataluna Esperantisto“ kaj per la esperantaj kaj katalunaj gazetoj, kiuj bonvolos ĝin represi.
9. La premiatulaj verkoj fariĝos propraĵo dum unu jaro de la Komitato de la Floraj Ludoj, kiu zorgos pri ilia publikigo sur „Kataluna Esperantisto“ aŭ aliaj Esperanto-gazetoj. Permeso por reproduktado dum tiu unua jaro oni devas peti de la Redakcio de „Kataluna Esperantisto“.
10. Eventuala aljuĝo de „Subpremioj“ nur signifas honoran mencion, ĉar ne estas aliaj efektivaj premioj krom tiuj difinitaj en la nuna alvoko.

Kroniko.

Por servi nian legantaron per ĉiam aktualaj, flindaj kaj kompletaj informaro, ni bezonas sciigojn (sur postkarto aŭ aparta folieto unuflanke skribita, sed ne inter-administrat aŭ privataj sciigoj) pri ĉiu novaĵo el la esp. movado. Kondiĉoj: rapide, koncize, flinde, legible (precipe nomoj).

Ankaŭ nunfoje ni devas treege mal-longigi la senditajn raportojn. Vi ŝparus al ni multe da laboro, se vi jam mem plej limigus la amplekson de viaj raportoj.

Eŭropo.

Aŭstrio.

Aŭstria Laborista Ligo Esperantista.

Novaj grupoj de ALLE fondiĝis lastatempe en Hallein, Innsbruck, Sieyr, Wiener Neustadt, Wiesenfeld kaj Wien. Novaj kursoj en Hohenau (35 p.), Sieyr (du kursoj) kaj Villach (du kursoj).

Britujo.

Novaj grupoj kaj kursoj.

Novaj grupoj de BEA fondiĝis en Blackpool, Farnley Tyas, Greenock kaj Witchurch. Kursoj koncenciĝis en Barnsley, Darlington, Edinburgh (tri kursoj: elementa, supera kaj skolta) kaj Peckham.

Franujo.

Perpignan. La 29. 11. Amika Rondo 5-an fojon ludis antaŭ neesp. publiko la prop. komedion „L' Heritage

Klodarec". — La 21. 12. okazos festeno je memoro de naskiĝtago de D-o Zamenhof. Eksterperpignanoj bonvenaj. Informo: Esperanto, Ecole Pigier, Perpignan.

Strasbourg (Elzaso). Antaŭ du monatoj komencis 2 germanlingvaj kursoj kun ĉ. 50 plekreskuloj, gvidis s-o H. Hotz. La 5. 12. malfermiĝis 2 novaj kursoj en liceo cambro: unu germanlingva de s-o Hotz kun 32 p., alia franclingva de s-o J. Damm kun 12 p. Entute 110 p. nun lernas Esp. 2 pliaj kursoj komencos baldaŭ en lernejoj cambroj. Direktoro de urba mezlernejo petis aranĝon de speciala kurso por geinstruistoj. — Du grandaj libroj vendas esp. librojn; la posedanto de unu el ili deklaris, ke li vendas pomonate ĉ. 100 esp. librojn. — La 14. 12. okazos koncerto je memoro de nia maljaro. — La vivo en la Asocio Strasb. de Esp. estas vigla. Post novjaro la asocio havas programon konstantan oficejon en la urbo. — La ĉi tie okazinta nacia kongreso dum aŭgusto kaj la rekomeno de la movado en Francujo entute helpas ĉi tie neatendite.

Toulouse. La 14. 12. okazos Zamenhof-festo kun prelego de s-o René Liéclé el Perpignan.

En Versailles la grupo organizis en la urbdomo propagandan paroladon de s-o Guadet, prof. en la liceo, kaj komencis kurson. Favoze raportis gazetaro. — La radio-klubo de la regiono de Languedoc voĉdonis dezir esprimon por Esp. — En la "Paca Lernejo" (Ecole de la Paix) en Paris, kies fondinto estas s-o Thivet, s-o van Euten faras ĉiutage esp. kurson. — Kurso en la Lernejo de Alta Komercia Instruado por fraŭlinoj en Paris. — La proksimjara franca kongreso okazos en Clermont-Ferrand.

Germanujo.

Berlin. La 8. 1. 1925 okazos granda prop. parolado n sonego de Herrenhaus (Domo de Sinjoroj). Parolados D-o Klemke, legacia konsulato Richter, tel. dir. Behrendt, red. Fitze, dir. Glütk k. a.

Halle a. S. Loka grupo de GEA kunvenas sabate je 7 h. en esp. hejmo, Geisstr. 29. — Loka grupo de GEA kunvenas en esp. hejmo, Weidenplan 30, ĵaŭde je 8 h. vesp. — Kursoj: lunde en Weidenplan, 13 p., gvid. k-do O. Berger. Merkrede en popolkirko, aranĝita de la komfakcio el membroj de SAT, 12 p., gvid. k-do A. Henneberger. Vendrede, 8 p. en loĝejo de l' gvid. R. Strauss. — Fondiĝis esp. sekcio en ĉi tie loka grupo de Turista Asocio „Natur-amikoj“, 8 p., gvid. R. Strauss. — Halle'a „Gazeto por fremduloj kaj trafiko“, aperante dufoje semajne, publikigas sub rubriko „Esp.-sciigoj“ esp. notojn.

Krefeld. Sup. instr. Karl Giessmann parolis 2. 12. en ŝtata lernejo por flinkuristoj. — 5. 12. parolado en oficiala instruista konferenco Mörs antaŭ 105 p.

Esp. naturamikoj.

La 25—26. 10. kunvenis esp. naturamikoj en Königstein ap. Elbe. Oni starigis centran estraron por Tutsaksio kaj sendis rezolucion al la estraro de la Asocio de Naturamikoj en Vien, postulante subtenon de esp. naturamikal celoj. Oni decidis mudi Esperanton en la servon de la internacia kultura proletara migrad-movado (kolleto de statistika kaj scienca materialo, de nk. kun naturabuloj, aranĝo de ekspozicioj, partopreno je olimpiado de Frankfurt 1925 ktp.). Aligo al SAT aŭ GLEA rekomendata. Kunhelpo flanke de UEA-anoj danke akceptata. Esp. naturamikoj sendu plenan adreson al k-do Joh. Uhlig, SAT-ano 2991, Pasmitz O. Aeus, Zwickauer Str. 34.

Hispanujo.

Cordoba. Laŭ propono de la 2-a kongreso de iberiaj esperantistoj en Bilbao okazos la 5-a kongreso en Cordoba, Andaluzio, la 10.—12. 5. 1925. Kongresotitolo 5 pes. Adreso por leteroj: Josep Berger, Claudio Marcelo 18; por mensongo: Juan Serrano Olmo, Calle Rejoj 1.

Palma de Mallorca. La proksima kongreso de Kataluna Esp. Federacio okazos ĉi tie la 21.—24. 5. 1925 samtempe kun la Intern. Floraj Ludoj.

Jugoslavio.

Bjelovar. Okazas tri kursoj: unu por gimnazianoj, alia por laboristoj, tria por burĝoj.
Daruvár. Du kursoj funkcias: unu por gimnazianoj, alia por urbanoj.
Ljubljana. Komenciĝis du kursoj kun entute 150 p. Sremska Mitrovcia. Fondiĝis esp. klubo.
Zem un. S-o Rajšić gvidas kurson kun 95 p. — Allan kurson de s-o Mihajlović partoprenas ĉ. 30 lernantoj.

Gazetoj por Esperanto.

La plej grava faktoro por la propagando estas la gazetaro. Tion pli ĝojige estas, ke lastatempe la grandaj germanaj ĵurnaloj komencas energie propagandi nian lingvon. La ekzemploj de „Berliner Tageblatt“ sekvis nun „Berliner Börsen-Courier“, dediĉinte specialan numeron de sia ĉiutaga ilustrita aldono „Bilder-Courier“ al Esperanto. La il. aldono de 6. 12. portas la devizon „Lernen Sie Esperanto!“ (Lernu Esperanton!), enhavas teĝan artikolon pri Esperanto kaj komencon de esp. kurso de s-o Dr. Glütk. 16 ilustraĵoj el la esp. movado ornamas la numeron: portretoj de D-oj Zamenhof, Privat, Steche, Arnoldh, Klemke (Nienkamp), de s-oj Drummond, Jacob, Bulthuis, Baghy, Wallon, Ellersiek, Glütk, bildoj de la viena kongreso ktp. Estas certe, ke aliaj grandaj ĵurnaloj imitos la ekzemplojn de „Berliner Tageblatt“ kaj de „Börsen-Courier“, kio pli bone efikos sur la publikon ol cent de la kutimaj paroladoj.

En Sofia, post la esperantema ĵurnalo „Svoboda“ ekaperis nova semajna „Ĵurnalo de l' knabinoj“, kiu ne nur propagandas, sed ankaŭ praktike aplikos Esperanton. Tial la ĉiutaga gesamdecanaro estas petata kunlabri sendante gazetojn aŭ eltranĉaĵojn de artikoloj il. koncernantaj la inon. La redakcio petas interŝanĝon kontraŭ similaj gazetoj. — Adreso de la redakcio: „Vesnik na devicite“, Veslic 11, Sofia, Bulgario.

Bibliografio.

Libroj.

Fest- und Werbeschrift, (Fest-kaj varb-presajo okaze 14-a de fondiĝfesto de esp. grupo „Progreso“ Bochum, 6. 12. 24.) 25 : 15 1/2 cm., 24 pĝ. kaj kovrilo. Enhavas programon, kantojn, prop. artikolojn, legekerzaĵojn kaj anoncojn.

Gazetoj.

Literatura Mondo, nov. Adreso: Eötvös u. 3, Budapest 6. — Kiel kutime esti aranĝita. Kun pure literatura enhavo kaj bonaj ilustraĵoj. La plej konataj esp. verkistoj kunlaboras.
La Suno Hispana, nov. Adreso: Mar 25, Valencia.
La Fervojisto, nov. Adreso: Jezuitska ul. 1, Zagreb, Jugoslavio.
Holanda Esperantisto 6. 12. Adreso: 1-e Sweelinckstraat 19. 11. Amsterdam.

Kataluna Esperantisto, nov.-dec. Adreso: Carme 50, Barcelona, Hisp.

Radio de Filintern. n-o 1, okt.-nov. Adreso: 1-a Tverskaja-Jamskaja 5, Moskva, Rusl. — Oficiala organo de Filatelista Internacio. Enhavas sur 48 pĝ. kaj kovrilo artikolojn en lingvoj germana, angla, franca, rusa kaj esperanta. Entute interesa revuo por filatelistoj.

Pola Esperantisto, sept.-okt. Adreso: Widok 19, Warszawa. Sennaculo, 4 12. Adreso: Leipzig-Siöteritz, Colmsir. 1, Germ.

Sennacieca Revuo, dec. Proletara revuo por literaturo, scienco kaj pedagogio. Adreso: Leipzig-Siöteritz, Colmsir. 1, Germ.

La Espero, nov. kaj dec. Adreso: Förlagsföreningen Esperanto u. p. a., Stockholm 1, Sved.

La Ora Epoko, okt. Adreso: Rieden bei Baden, Aargau, Svis, Landstr. 277.

Esp. Verband Berlin, Nachrichtenblatt, dec. Adreso: Berlin S. W. 61, Wilmstr. 5.

International Language, nov. kun The British Esperantist, 17 Hart Street, London W. C. 1.

Konkordo, okt. Adreso: Ilica 40, Zagreb, Jugosl.

Der Arbeiter-Esperantist, dec. Adreso: Leipzig-Thonberg, Wasastr. 16 pl., Germ.

Gazetaro.

Bilder-Courier, ĉiutaga ilustr. aldono al grava ĵurnalo Berliner Börsen-Courier. La numero de 6. 12. estas speciale dediĉita al Esp.

Berliner Illustrierte Zeitung 7. 12. Plej disvastigita germana ilustr. revuo, eldonnombro: ĉ. 1 1/2 milionoj. Du notoj pri Esp.

Der Deutsche Rundfunk, Berlin, 7. 12. Daŭrigo de esp. kurso.

Telegraphen-Praxis, Lübeck, okt. Interesa art. de tel. dir. D-o D. — Ĉu Esp. estas uzabela por la praktiko de telegrafo?

Bankbeamten-Zeitung, Berlin, 31. 10. Art. pri Esp. kaj bankoj.

Magdeburgische Zeitung, 1. 12. Noteto pri 14-a germ. esp. kongreso.

Auerbacher Zeitung, 21. 9. Esp. lingvo de radio. — 18. 11. kaj 5. 12. Esp. anguloj.

Strassburger Neueste Nachrichten, 30. 11. kaj 5. 12. Pri esp. kursoj. La samaj artikoloj aperis ankaŭ en 4 aliaj germanlingvaj kaj 5 franclingvaj ĵurnaloj.

O Journal, Rio de Janeiro, 14. 11. Art. pri Nobelpremiiloj trad. el ET.

Iran, organo de Soc. Int. de Kor. kaj Interŝ. en Teher, Persujo, aprilo kaj septembro. Adreso: N. Falsafi, Direktoro de Klubo Iran, Teheran. — En lingvoj franca, persa kaj esperanta. Kun esp. kurso kaj anoncoj pri ET, UEA kaj SAT.

Komercio.

III-a Int. Foiro de Danzig.

En ĉi tiuj tagoj dissendas la estraro de la Internacia Danziga Foiro al ĉiuj UEA-delegitoj, esp. grupoj kaj gazetoj siajn prospektojn en Esperanto, invitante al la vizito de la III-a Int. Danziga Foiro 5—8 febr. 1925. Al la prospekto estas aldonita aliĝilo en Esperanto. Ni insiste petas ĉiujn komercistojn uzi ĉi tiun aliĝilon kaj interesigi pri la foiro, samtempe petante ĉiujn samideanojn traduki la aldonitajn tekston kaj aperigi en nacilingva gazeto. (Ne forgesu sendi al ni la koncernen ekzempleron!). Se ni sukcesos konvinki la foiran estraron, ke ni povas fari per Esperanto eksterlandan reklamon, ĝi starigos daŭran Esp.-fakon. Ĉiujn demandojn direktu al III-a Internacia Danziga Foiro (Esperanto-fako), Danzig.

Esperanto-skrubmaŝino.

Nova aparato, apoganta la esperantistojn je ne esperanta maniero, estas ekvendata de la AEG (Allgemeine Elektrizitäts-Gesellschaft, Generala Elektra Societo). Ni ekkonas el tio, ke tiu ĉi mondfamo kompensas prizorgi niajn bezonojn. Skrubmaŝino memskribanta estas malnova dezirato de ĉiuj penadantoj, dum monatoj por lerni maŝinskrubadon sufiĉe rapidan. Oni taskis solvi la problemon fiamaniere: oni parolas en telefon-membranon kaj „tradukas“ (transportas) helpe de gasflamo ĝiajn svingmovadojn kaj tiujn de elektre agaj seĝen-ĉeloj al la skrubmaŝino. Tial ke la teknika parolmaniero, la tonaleco ktp. de la diversaj homoj diferencegas, la efektiva solvo de tiu ĉi problemo verŝajne estos ankoraŭ dum longa tempo neefektivegebla („pia“) deziro de la homaro.

Alia multjara problemo (naskiĝinta en la jaro 1887) estis la kreado de praktika speciala Esperanto-skrubmaŝino. Kiel oni povas aŭdi de kelkaj entuziasmaj esperantistoj, almenaŭ tiu ĉi problemo nun estas solvita, laŭ la sekva nia maniero:

1. La maŝino de la AEG ĝis nun ne skribas aŭtomate, sed povas esti, sekve de ĝia tute aparta klavaro, uzata de ĉiu ser. speciala studado. Nur du klavoj devas esti servataj.
2. La maŝino skribas je mirinda rekteco de la linioj, kopiĝa forto je diversaj koloroj.
3. Per la maŝino oni povas skribi krom Esperanto ankaŭ germane, france kaj angle, plue greke kaj la plejmulton de orientaj lingvoj.
4. La maŝino estas ankaŭ porvojaĝa maŝino tre figneca, ekzistas jam bonegaj atestoĵoj pri ĝi de kelkaj gvidantoj esperantistoj.
5. Oni turnu sin al la AEG — Deutsche Werke, Aktien-gesellschaft, Berlin W. 66, Mauerstr. 85/84, kaj ekscias fiam, ke ĉio, kio estas dirita pri la maŝino en la antaŭaj linioj, estas tute efektiva, kaj ke tia praktika aĵo signifanta revolucion kostas nur 140 gmk.

Robert Schwarz,

Charlottenburg, Pestalozzistrasse 55. III.

Financa informo.

Unuiĝo de la Kooperativoj por Miildomaĵoj.

Eldono 1922 50/o.

50-a ĉiunumona elirado de 10 novembro 1924.

S 4450 N 5	repagebla je 250 000 fk.
S 192350 N 18	„ 100 000 fk.
S 91787 N 8	„ 100 000 fk.

La aliaj numeroj de tiuj serioj estas repageblaj je 300 fk.

Eldono 1925 50/o.

18-a ĉiunumona elirado de 20 novembro 1924.

S 214056 N 3	repagebla je 100 000 fk.
S 389077 N 5	„ 100 000 f.c.
S 51674 N 4	„ 50 000 fk.
S 1798 N 1	„ 50 000 fk.
S 14072 N 5	„ 50 000 fk.

La sekvantaj titoloj estas repageblaj je 10 000 fk.

S 240814 N 5	S 234820 N 4	S 562956 N 5
S 118458 N 2	S 388660 N 5	S 500935 N 5
S 370854 N 5	S 16751 N 1	S 291084 N 5
S 556295 N 1	S 307626 N 2	S 264836 N 1
S 23446 N 1	S 278492 N 5	S 166326 N 2

La aliaj numeroj de la supreciitaj serioj estas repageblaj je 550 fk.

La repago de la eliritaj titoloj okazas pere de la Nacia Banko de Belgujo.

Leterkesto.

J. Z. en W. Dankon por letero de 5. 12. kaj pro bonaj konsiloj.

J. D. L. en Sofia. Por via PK ni pagis punafrankon. G. en S. Kanto bedaŭrinde ne sufiĉe perfekta por publikigo.

K. en P. Nur resp.-kuponoj kun ruĝa surpreso dois-flanke validas. Ne akceptu aliajn de via poŝtoficejo!

Libera tribuno.

Sub tiu ĉi rubriko laŭ disponebla loko estas lojale enpresataj ĉiuj sciigoj, informoj, kritikoj, liberaj vortoj ktp. La redakcio tamen ne prenas sur sin respondecon pri la enhavo, sed ĝi rezervas al si la rajton eventuale rifuzi netaŭgajn artikolojn.

276. Pri propraj nomoj.

Mi deziras tuŝi gravan demandon pri lingva formo de propraj nomoj en Esperanto. Mia opinio uza do en Esperanto de formo por propraj nomoj, kiu n. ili havas en tiuj naciaj lingvoj, estas tre maloportuna kaj tute kontraŭlogika rilate al fundamentaj celoj kaj taskoj de lingvo Esperanto. Efektive, la lastaj, kiel oni scias, sendiŝupe enhaviĝas en tio, ke homoj sciintaj Esperanton facile komprenu ĉiun tekston en tiu ĉi lingvo, tute ne sciante iajn naciajn lingvojn, dum propraj nomoj skribitaj en naciaj formoj certe postulas de leganto scion de alfabeto kaj de gramatiko de tiuj ĉi naciaj lingvoj. Mi montras por ekzemplo kelkajn proprajn nomojn en tiu ĉi formo, kiu estas uzata ordinare en la gazeto ET. Ekzemple: Warszawa, Paris, Edinburgh ktp. Neniu esperantisto, ne scianta polan lingvon, povas tralegi facile kaj esti plene certa, ke li tute ĝuste tralegis la unuan vorton, tio estas tiel, kiel ĝin tralegos homo scianta polan lingvon, nome jermaniere: Varŝava. Pri tio, ke ĉi tie literojn „sz“ oni devas tralegi ne per esperantistoj s. kaj z sed per esperanta sono s, neniu esperantisto, kiu ne scias polan aŭ ian similan nacian lingvon, povas kaj devas scii. Mi proponas uzadi esp. formon por tiu ĉi urbo: aŭ Varsovio, aŭ Varŝavo, aŭ Varŝava, sed neniel tute ne legeblan en Esperanto kaj ne konateblan por ĉiu esperantisto formon: Warszawa. Same oni devas diri pri vorto esperanta Parizo. Tiu esperantisto, kiu ne scias francan lingvon, neniam tralegos vorton „Paris“ en lingvon Esperanto tiel kiel ĝin oni devas tralegi en lingvo franca, t. e. „Pari“, dum la vera esp. prononco „Paris“ neniam respondas al efektiva nacia nomo de tiu ĉi urbo. En n-o 212 de ET estis ekz. notitaj multaj hinaĵoj, kies nomoj neniu esperantisto ne scianta anglan lingvon povas kompreni kaj prononci; tiel nome: Changchung, Kiengchow, Nantung, Hankow ktp. Samon oni devas diri pri „Capri“ anstataŭ komprenebla por ĉiu esperantisto „Kapri“, „Shakespeare“ anstataŭ „Sekŝpir“, „Kreuz“ anstataŭ „Kreĉ“, aŭ „Kreŭc“ ktp. *Riŝardo Leliva, Leningrado.*

Tre multaj esperantistoj liaj opinias, ke ĉiuj aliaj esperantistoj estas poliglotoj. Ili ĉiam skribas nomojn en nacia ortografio. Ĉu ili neniam pensas, ke iliaj leteroj kaj artikoloj povos esti laŭte legataj? Ke el skribado de nomoj en esp. ortografio povas aperi nenia malkompreniĝo, mi povas pruvi per ekzemplo de lingvoj rusa kaj ukraina. Ambaŭ lingvoj havas specialan alfabeton (slavan) kaj ne povas konservi en fremdaj nomoj ilian ortografion nacian. Tamen nenia malkompreniĝo aperos. Kompreneble, ofte la prononco de nomo la lingvoj esperanta, rusa aŭ ukraina per siaj ortografioj povas transdoni nur proksimume, sed estas pli agrabila proksimuma prononco, ol senprononca literaro. Trosimpatiantoj por nacia nom-ortografio povas la nacian almenaŭ unuofon aldoni en krampoj (ĝenerale nacia nom-ortografio en esp. lekato estas superflua balasto). *N. Medousov, Tambov, Rusujo.*

Recepto por Kristnasko.

(Eventuale ankaŭ alinacianoj sendos receptojn pri manĝaĵoj preferataj en ilia lando aŭ regiono. Ni volonte aperigos iom post iom Internacian Receptaron. — Red.)

Kristnaska pudingo.

Bezonojaj.

500	gramoj da korintoj
500	„ sekvinberetoj (angl. sultanas)
500	„ kandita ŝelo (diversaj fruktoj)
500	„ sukero (de Demeraro, aŭ bruna)
500	„ hakita bovrensebo
500	„ sekvinberoj (angl. raisins)
500	„ paneretoj
250	„ faruno
50	„ migdaloj
10	„ muskato raspiata
10	„ mikstaj spicoj
9	„ ovoĵ novaĵ
0.75 litro	„ lakto
0.25	„ brando aŭ rumo.

La suko kaj raspiata ŝelo de du citronoj.

Lavu, purigu kaj sekigu la korintojn, sekvinberojn kaj sekvinberetojn. Senŝeligu la migdalojn kaj haketu ilin. Senkernigu la sekvinberojn. Traŭncu pecete la kanditan ŝelon. „Batu“ la ovojn. Kunmiksu la farunon, panon, rensebon, muskaton, spicon kaj sukerojn. Kirlu bone. Aldonu la fruktojn. Intermiksu bone. Aldonu la ovojn al la lakto kaj intermiksu. Verŝu en la ĝeneralan miksaĵon kaj ree kirlu. Aldonu la citronojn kaj sukron. Ankoraŭ kirlu. Nun la miksaĵo staru dum dek horoj. Fine, aidonu brandon aŭ rumon kaj kirlu por la lasta fojo. Grasumu pelvojn, plenujn ilin per la miksaĵo. Kovru per grasumita papero, kaj sur tio sternu dikajn paston faritan el faruno kaj akvo.*) Kovru ĉion per pudingtuko kaj ligu. Bolu dum naŭ aŭ dek horoj.

Servu kun brando flamanta aŭ kun blanka sukero aŭŝprucita. *W. R. W., Torquay.*

*) Tio ago ne estas absolute necesa, sed helpas ekŝigi la akvon dum la bolado.

**Importado kaj eksportado.
Komercaĵoj el tutmondo.**

Grenoj, legomoj, vinoj, kafo, sukeroj, kakao, aŭtomobiloj, skribmaŝinoj, fruktoj, peklaĵoj, ktp., ktp.

Oni akceptas reprezentadojn de ĉiu eksterlanda firmo, kiu volas komerc-rilatojn en Portugalujo.

Rilatoj per Esperanto.

Ferreira & Ferreira, Lda.

Rua da Prata, 59-5.

Lisboa Portugalujo

**Komerca Instituto
„Esperanto“
Jägerndorf (Ĉeĥosl.)**

liveras ĉiuspecajn ornamaĵojn,
silikajn pentraĵojn ktp.

Kondiĉoj de akto je kredito de tiaj obligacioj*, kiuj ĝuas procenton de 10 fk. (1921 4%), 12,50 fk. (1922 5%) aŭ 25 fk. (1923 5%) kaj kies procento kaj repago estas

garantiataj de la belga ŝtato.

Pagoj	Eldono 1921	Eldono 1922	Eldono 1923	3 titoloj (unu de ĉiu eldono)
12 monataj de	18,00 fk.	22,50 fk.	46,00 fk.	86,00 fk.
4 trimonataj	54,00 "	67,50 "	138,00 "	258,00 "
18 monataj de	12,50 "	16,00 "	32,00 "	60,00 "
6 trimonataj	37,50 "	48,00 "	96,00 "	181,00 "
24 monataj de	10,00 "	12,50 "	24,50 "	46,50 "
8 trimonataj	30,00 "	37,50 "	75,50 "	139,50 "

De la nuna pago subskribanto estas sola posedanto de la titolo(j), plenrajte partoprenas la elirojn kaj ĝuas la procenton. —: Subskribu sendante vian unuan pagon per internacia poŝtmandato

F. Bormans, Rubensheide 52, Capellen (Antv.), Belgujo.

* Vidu la „Financan Informon“ en la hodiaŭa numero!

Mi estas aĉetanto

de
aveno
hordeo
ostoj
kornoj
vagon- aŭ ŝtipleveradoj. Oferojn kun specimenoj sendu al

**Komercentrepreno Dubach,
Bissone—Lugano (Svislando).**

**Du allogaj
esperantajoj.**

- a) 4 ĉarmaj kantoj en Esperanto kaj angla lingvo, kun muziko kaj fortepiana akompanado. Grandformataj 8 paĝoj. 1/— afrankite.
- b) Struvelpetro, kun 24 koloritaj bildoj kaj versoj en Esperanto. 2/— afrankite.

Revendistoj ricevas rabaton.

J. D. Applebaum, Liverpool, Anglujo

11 Mayville Rd., Mossley Hill.



Ĉiu esperantisto nepre havigu al si la specialan Esperanto-skribmaŝinon

MIGNON

Ĝi ebligas ŝanĝon de la tiparo por ĉiu ajn lingvo de la mondo dum kelkaj minutoj. La plej nova modelo de malnova sistemo. Rapide lernebla! Modera prezo! **Prezo 140 gmk. (175 sv. fk.).**

Skribu tuj esperante al

**AEG-Deutsche Werke
Berlin W66, Mauerstr. 83-84**

Entrepreno de UEA.



LEIPZIG-A FOIRO
La ĝenerala internacia Foiro de Germanujo

La unua kaj plej granda Foiro de la mondo. Same grava por ekspozantoj kaj por aĉetantoj. Ĝenerala Specimenfoiro kun Fairoj por Tekniko kaj Konstrufako

Printempa Foiro 1925 de la 1a ĝis 7a de marto.
Teknika Foiro de la 1a ĝis 11a de marto.
Aŭtuna Foiro 1925 de la 30a de aŭgusto ĝis 5a de septembro.
Teknika Foiro de la 30a de aŭgusto ĝis 9a de septembro.

Informojn donas kaj aliĝojn akceptas la Fairoficejo por la Specimenfoiroj en Leipzig:

**MESSAMT FÜR DIE MUSTERMESSEN
IN LEIPZIG**

Presejoj!

La presado kaj eventuale la liverado de papero kaj klišoj por amas-eldonaĵo de libroj **estas akirebla.**

Kontraŭ 2 sv. fk. aŭ egalvaloro estas sendata kajero kun detalaj kondiĉoj. Skribu tuj al **Postfach 6557, Bissone-Lugano (Svisl.)**

**Pensiono Erika
Tschierschen apud Chur**
(Svislando).

Vintra restado je malgrandaj prezoj kaj bonega nutraĵo. - Ski-ekskursoj, glitejo.

Jakob Wiesner.

FER-MAGAZENO

ŝraŭboj ĉiuspecaj, dratstiftoj.

Ekstremaj prezoj.
Postulu oferton!

**Hermann Dix, Zeulenroda
Turingio Germanujo.**

Anoncetoj.

- FIANĈIĜO. S-ano F-lino Milica Lazić kaj s-ano Ante Marinović el Janjina geŝanĉiĝis. [1]
- FIANĈIĜO. Belga s-ano F-lino Raphaële de Cock en Hoboken-Antwerpen kaj kataluna s-ano Antoni Valls en Ripollat Barcelona geŝanĉiĝis. [1]
- EDZIĜO. S-ano D-o Fritz Ziegelbauer kaj F-lino Anko Glavor el Janjina geedziĝis. [1]
- HELPU BONKORULOJ! Mi havas en manuskripto grandan originalan romanon „Sen titolo“, kiun mi cedos malkare al ĉiu, kiu helpos al mi mone daŭrigi edukadon de miaj infanoj en la urbo. Skribu al J Ŝirjaev, Baklanka, gub. de Vologda, Rusujo. [3]

Korespondo kaj Interŝanĝo.

- Johano Vincez, Szombathely, Ujvilag ucca 21, Hungarujo, PK, L kun ĉiuj landoj. [1]
- Fraŭlo, poŝtoficejo, 21 jara, deziras interŝanĝi per il. PK kaj L kun gesamideanoj. Bonvolu skribi, nepre respondo! Latvio, Rujene, Pasta Kantori, Jaunbr. [1]
- S-o F. Junge, Parallestr. 28, kaj s-o D. Dallwig, Castroberstrasse 258, Bochum, Germanujo, deziras interŝanĝi PK kaj PM kun ĉiuj landoj eventuale ankaŭ kontraŭ papermono. [1]
- Studento A. Ozols, Riga, Latvio, Dzirnavu ielā 70, dz. 5, studento societo „Patria“, deziras korespondi kaj interŝanĝi il. PK kun junaj esperantistinoj ĉiulanda. [1]
- Esperantisto-Poeto George Deŝkin, Moskva, Rusujo, sciigas al ĉiuj amikoj de Esperanto, ke lia pli maljuna frato, blindiĝinta majstro Nikolajo Deŝkin (Wilno, Polujo, ul. Solińska 26) kun sia malsana edzino kaj sepiara filineto suferas grandan mizeron. [1]
- Deziras interŝanĝi poŝtkartojn pri politika kaj sociala problemoj. Otto Lüerssen, Gelsenkirchen, Essenerstr. 4 Germanujo. [1]
- Jozefo Benkö, Szombathely, Körmendi ucca 19, Hungarujo, PK, L precipe kun fraŭlino. [1]
- S-o Béla Juki, Budapest X, Hölgy-u 48, deziras korespondi per il. PK kun ekster-eŭropanoj kaj kun ĉiulanda fratilinoj. Konstante respondos. [1]
- Ing. s-o Gino Braceli, Via Vicenza 56, Roma 21, deziras tujmondajn fotografaĵojn de montoj. Li certe resendos fotografaĵojn kiajn oni deziras. [1]
- Kriŝnaska deziras. Dezirante pligrandigi mian kolekton de il. PK (speciale urvidajoj) mi sendos belan karton de Polujo al ĉiu, de kiu mi ricevis karton (bfl.). S-o Johano Dalko, Mickiewiczza 46, Katowice—Zaleze, Polujo. [1]
- Fraŭlo Viktor Van Beylen, artprentisto, Grootte Markt 50 Antwerpen (Belgujo), deziras korespondi per PK kaj L pri ĉiuj interesaj temoj kun gesam-oj el ĉiuj landoj. [1]
- Oswald Ulbrich, Ebersbach i. S. 168, Germ., deziras korespondi kun seriozaj ĝeesperantistoj el ĉiuj landoj (L, il. PK) pri esp. movado, geografia, naturbelaĵoj kaj aliaj temoj. Interŝanĝas PM. Ne sendas unue, ĉiam respondos. [1]
- S-o Max Sommerer, modelisto, Längenauerstr. 9, Selb, Bavarujo, Germ., deziras interŝanĝi kun ĉiuj landoj PK il. bfl., PM, papermonon, papilinojn kaj aliajn interesajn, kontraŭ artporcelan-objektoj; certe respondos. [1]
- S-o Ludwig Gmeiner, Ansbach, Brauhaustr. 8, Bavarujo, deziras korespondi per il. PK aŭ L kun ĉiuj landoj. [1]
- Estimataj samideanoj de tutmondo! Mi deziras korespondi per il. PK (bfl.) Ĉiu ricevos certe respondon! Aloy's Huth, Materborn-Cleve, Schulstr. 20, Germ. [1]
- Bazilo Averin, Rusujo, Asirahani, Poŝtkesto 14, Filat, régna bileto N-o 165 „ĉerez Uplonomoĉennogo v. Moskve. Tverskoj bul. 12.“ Interŝanĝas PM kaj papermonojn. (Ne sendu germanajn kaj ĉeĥoslovakajn PM!) Sendu kvankam 1000 pecojn sed ne sendu pli ol 10 pecojn de la sama speco, alie oni konfliktos vian sendaĵon! Mi respondas ĉiam. [2]
- Cu iu azia viro aŭ virino, juna aŭ maljuna, volas korespondi kun sveda sinjorino pri religiaj aŭ seriozaj aferoj? S-ino Henny Widström, Tegen 4, Lidingsö villastad apud Stockholm, Svedujo. [1]
- La anoj de „Esperanto-Bildungsverein Supren“ interŝanĝas PM, PK il. bfl., L kun la tuta mondo. Wien VII., Kaiserstr. 56 (Kaffee). [1]
- S-o J. J. Piet, Willemstraat 95, Eindhoven, Nederlando, deziras interŝanĝi PM kaj tutaĵojn. Korespondas esperante, angle, germane, france, holande. Sendu nenion, skribu unue. [1]
- Mi deziras korespondi kun ĉiuj landoj. Kolektas PK il. S-o Ake Liliestrand, Karlsundsgratan 9, Örebro, Svedujo. [1]
- S-o Horváth Francisko deziras korespondadi kun ĉiulandaĵoj. PK, PM. Adreso: Szombathely, Alsó hegy, Hungario. [1]
- Pirma a. E., Germanujo, Gartenstr. 52, s-o Paul Glöckner komercinstruisto, serĉas korespondantojn por si kaj siaj 34 ĝelernantoj. [1]
- S-o Oskar Schädlich, Neu-Gasse 1, Zwickau-Schedewitz i. Sa., Germanujo, deziras interŝanĝi PK il., L, gazetojn ktp. kun tuta mondo. Respondos nepre. [1]
- Richard Gerhard Börner, Dresden-A., Poststr. 21, prezentigas peri la aĉeton de ĉiuj germanaj komercaĵoj. [1]
- J. B. E. de Koster ŝanĝas PK il. kaj PM. Daltonstraat 98, Den Haag, Holando. [1]
- F-lino, poŝtoficejino, 21 jara, deziras interŝanĝi per il. PK kaj L kun gesamideanoj. Bonvolu skribi, nepre respondo! Latvio, Rujene, Pasta Kantori, Jaunbr. [1]
- Bulgarujo, Plevne — kv. 8, ul. 4, n-o 51, N. D. Iskakov — deziras korespondadi kun tuta mondo, ĉiam respondas, interŝanĝas papermonojn, naciajn esp. gazetojn, il. PK, PM ktp. [1]
- S-o Zeley Ferenc, Szolnok, Városháza (Hungarujo), deziras interŝanĝi PM, respondos nepre. [1]